GISTO, JUN – 2004
VASKE, G.Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br
Tra ttt-sendebla skribo.

RADIO

Miaj tre karaj VK-rondanoj, pardonu al mi pro la insista rememorigo: post unu monato estos inaugurita la 89ª UKE, en Pekino, ke nuntempe eblas audi la Chinan Radion per superba signalo – S-59+ lau radioamatora difino – Kaj gxi diskonigas kongresajn erojn kiam la evento okazas alilande, des pli multajn informojn oni povos audi en la momento kiam ili okazas, kvazau parolata Kongresa Kuriero, el Pekino. Auskultanto sentas sin kvazau li/sxi persone cheestas surloke kaj gxuas la tutsemajnan etoson de Esperantio. Vi, kiu parolas sed ne chiam tuj trovas la necesajn vortojn dum vi parolas sed pensas ke tio sufichas, ne kondamnu min, se mi asertas ke vi estas unu el la neglektemaj samideanoj kiuj elbusxigas lautvoche "Mi amas Esperanton" sed, envere trompas sin mem. Validas la konsilo "estu kompatema je aliuloj sed estu rigora kontrau vi mem". Kiu observas, tiu rimarkas, ke mankas ne multo por altniveligi sian parol- komprenkapablon: observi chu la verbo estas au estas ne-transitiva, observi chu en la frazo cheestas prepozicio au ne, por ne plu erari pri la akuzativo. Automate detekti tion, oni lernas per daura praktikado. Kaj...ne pretendu senkulpigi vin dirante ke mankas oportunoj. Krom legindaj libroj, nuntempe China Radio provizas lernantojn per modelaj esperantaj paroladoj, per plej zorga prononco, chiutage, dum unu tuta horo. Ja estas gxuo observi kiel zorgeme la geparolistoj aldonas personan ritmon kaj entonacion al siaj esprimoj. Kaj, aldone...ne volu senkulpigi sin, ke vi ne posedas taugan R-ricevilon. Por ellerni Esperanton, kiom vi pretas elspezi?? 100 Realojn.? Nur 50 Realojn? – Tio sufichas. Iru al tiuj surstrataj tendoj au budoj, en POA. Estas multaj, che la strato Vigário J.Inácio, fronte al la antikva kinejo Karlos Gomes. Provu paroli kun fraulinoj Izabel au Raquel. Ili jam scias pri la afero. **GRAVA KONDICHO:** Iri tien inter la oka kaj naua horo matene (dum kiu CRI elsendas) kaj testi la aparaton, chu gxi vere kapablas ricevi **7150 Khc (40m)** char ja ekzistas aparatoj kiuj estas ne sufiche sensemaj. Vi devas almenau esti kapabla konstati ke vi audas Esperanton, kvankam la signalo estas ne tre forta. Vi tuj akiru 15 au 20m da izolita drato kaj etan "boca de jacaré) = etan krokodilbusxon en elektronajxa butiko. Per gxi vi facile kontaktigos la draton al la teleskopa anteno. Alveninte hejme vi jxetos la .draton sur vian tegmenton au arbon kaj kontaktigos gxin kun la teleskopa anteno. Post tio vi tutcerte audos komforte. Kaj, la vera prezo?...vi surprizigxos! Do, ne plu preferu krokodili kiam al vi mankas la gxusta vorto! Estu lertulo, por ne honti antau vizitantoj...dum la Brazila Kongreso de Esperanto venontjara, en POA.

JUNAJ GEEDZOJ.

Maturaj homoj certe ne fantazias, ke jxusa geedzeco dauros kiel dumviva mielmonato. Chefe ne tiuj paroj kiuj spektis la usonan filmon "The Sevenyear Itch". Mi tradukas la titolon kiel "La Jukado de la Sepa Jaro". La filmo montras scenon de la unuaj jaroj de kunvivado. Preskau nur gxojaj kaj gajaj eventoj ilin felichigas, flanke de kelkaj

korpremitecoj kutimaj en chiuj familioj. Sed...chirkau la epoko kiam proksimigxas la memortago pri la sepa jaro de felicha edzeco enfalas kelkaj kvereloj preskau nesupereblaj. Ni flankenlasu tiajn malkonsentojn char veteranaj geezoj ilin konas. Iom da pacienco, prudento kaj amo al la paco baldau disfumigas tiajn "CB",lau meteologia difino = stormkauzaj dikegaj nigraj nuboj kaj la sekvan tagon la vivo dauros ebena., trankvila.

Tute alian problemon vi spertos post kiam la seksapetito deklinigxas. Vi eble opinias ke tiam chio normale fluas en la hejmo, ke ambau konformigxas al la natura evoluo de la limigitaj postuloj de chiu individuo. Oni ne forgesu ke homoj diferencas unu de aliaj, oni ne forgesu la intrigojn spekteblajn sur TV-ekrano kie nuntempe okazas, por lautradicie edukitaj homoj, nekredeblaj rivelacioj rilate al moroj. Okazas erotikaj scenoj kun junulinoj kiuj ja estas delicaj frandajxoj por la okuloj de viro.Tiaj frandajxoj igas oldulojn senvole malkasxi seniluziigxon pri, eble, kvardek jaroj da edzeco, chiam che sama virino, se ne per vortoj, certe per pli kaj pli maloftaj manifestacioj de amo kaj amoradoj. Observemaj edzinoj notas al si la longajn tempospacojn inter unu kaj sekva seksumado. Klera edzino, kiu diligentas scii pri la mankoj de grizuloj, kompreneble neniam emas suspekti pri la fideleco de sia kara edzo. Damnindan situacion tamen suferas edzo kies edzinjo ignoras lian lantan potencoperdon lau li oldigxas kaj sxi suspektas pri malfideleco. Karaj edzinoj, informigxu akurate, por ne maljuste suspekti kaj suferigi vian fidelan dumvivan kunulon.

SAMIDEANO

Agrablan surprizon ricevas diligentuloj, kiuj sxatas **legi nacilingvan** novan vortaron...ne nur konsulti. Chu vi jam trovis "samideano" ? Gratulojn!

ANIMALAJ RAJTOJ

"Mi favoras la rajtojn de la animaloj same kiel rajtojn homajn. Tiu estas propono de estulo integre homa"- Abraham Linkoln = Usona Prezidento.

IOM da Bonhumoro.

MALBONECO

Migranto veninta al internlanda urbeto, marke de farindajxoj, decidis cheesti kokan batalon. Tuj post eniri la ejon li pridemandas kunulon, kiu estas la" bona" koko, (subkomprenigante la plej bataleman). – Estas la blanka, venis la respondo. La vojagxanto vetis grandan sumon je la indikita koko. Tuj en la komenco li devis konstati ke la rugxa koko kvazau mortigis la blankan. La perdinto demandis la informinton: kial vi trompis min? La respondo estis: vi demandis, kiu estas la bona koko, kaj mi informis gxuste. La blanka. Se vi estus demandinte, kiu estas la malica...

INA VENENO

Kial psikologia sercxesploro al viroj chiam dauras malpli longe ol al virinoj? – Tial ke, en la psikologia retrorigardo al lia infanagxo, viro jam atendas tie.

LIBERO

Edzo plendas: morgau edzinjo festas sian tridekjaran naskigxtagon kaj mi ne plu sias kion originalan donaci al sxi. Kolego proponas: donacu al sxi atestilon proponante tridek minutojn da intensa amo. Sxi adoros tion. – Sekvan tagon la kolego scivolis – Nu, chu vi plenumis mian konsilon? – Jes . – Kaj sxi?...chu sxi aprecis? – Jes, vere. Sxi salte starigxis, donis al mi kison surfruntan kaj forhastis dirante: Gxis duonhoro pli poste...